



KULTURAJ KAJEROJ

1960

Majo - Junio

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatoanoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

Promesis kunlabori en 1960 :

William Auld (Britujo)
Julio Baghy (Hungarujo)
Delfi Dalmau (Hispanujo)
Alberto Barrocas (Urugvajo)
Hannes Koivu (Finnlando)
Robert Martin (Francujo)
Eugeniuzs Matkowski (Pollando)
William Perrenoud (Svislando)
M. de Waard (Nederlando)

kaj aliaj diverslandaj elstaraj esperantistoj.

ENHAVO

Ni fosu nian sulkon — J. Regulo-Perez.

Esperanto tra la mondo.

Turismo :

Bretonio vin vokas III) (R. Martin).

Norda Francujo.

Niaj poetoj — E. Matkowski.

Mondfamaj francaj verkistoj — E. Motillon.

El ie en la Mondo :

Aŭtune tra Israelo (Kabe - S. Guillot).

Gramatikaj respondoj — D. Dalmaŭ.

Fantaziaĵoj - Ĝojo, de A. Ĉeĥov (tr. R. Martin).

Nia Konkurso.

La junaj detektivoj : J.-H. Sullivan.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

J. Regulo-Perez skribis por vi.

^ Margenoto pri la diskuto ata-ita

NI FOSU NIAN SULKON !

« Ĉi tiu nomiĝis Muhammad Abd er-Rahman, sed Madeleno kaj ŝia patrino ĉiam nomis lin **Maoméd**, kun tiu franca provinceco, kiu ĉiam misprononcas fremdajn nomojn, kaj firme kredas, ke la vera nomo de la itala pentristo estas Le Corrège, kaj nur malkleraj italoj nomas lin Il Correggio ».

Tiun sagacan konstaton de **Newell** (Bakŝiŝ, P. 9) konfirmis al mi jam plurjaraj rilatoj kun konata homo de nia movado, al kiu mi okaze klarigis dufoje, ke hispanoj havas laŭleĝe du familiajn nomojn, el kiuj la patra kaj ĉefa estas la antaŭlasta ; nur je mia dua indiko li respondis, ke tiu kutimo de la hispanoj estas erariga kaj maloportuna, kontraŭ la klare logika de la propra kaj najbaraj landoj, kaj tial, ĝis nun, konsekvenca al sia klara logiko, tiu samideano nomas min S-ro Pérez.

Ion similan mi trovas en la kampanjo, kiun ŝajne patronas « Heroldo de Esperanto » kontraŭ la klarigo de la verbaj aspektoj, kiun faris S-ro Kalocsay kaj Waringhien en **Plena Gramatiko**, kaj ankoraŭ pli detale S-ro Waringhien en **Lingvo kaj Vivo**. Se la afero estus tiel sendanĝera kaj naŭva kiel tiu de la personaj aŭ familiaj nomoj, mi apenaŭ estus ĝin priatentinta. Eĉ el la maro kuvo ne povas ĉerpi pli da akvo, ol ĝia kapablo permesas ; kaj se juĝi laŭ kelkaj el la artikoloj de diversaj samideanoj, kiujn « Heroldo de Esperanto » publikigis ĉirkaŭ tiu temo, ekzistas tute ordinarnaj gramatikaj faktoj, kies kernon ne ĉiuj sondiloj povas atingi.

Sed ja la afero estas danĝera, kaj povas fariĝi katastrofa por la unueco de nia lingvo, pro la maniero ĝin prezenti. Nur ĝi estu konsekvence kaj lojale eksponita, kiel okazis, kiam S-ro Ing. Isbrucker, Prezidanto de la Akademio de Esperanto, estis en Tenerifo, en la aŭtuno de 1959. Ni priparolis la temon de la pasivaj participoj, okaze de la apero de **Lingvo kaj Vivo** ; S-ro Isbrucker neniel agnoskis la klarigon de S-ro Waringhien, kaj kiam en la daŭrigo de la kon-

versacio mi argumentis al li la fakten ekziston de la aspektoj en la zamenhofs uzado, de la Fundamento ĝis la Biblio, S-ro Isbrucker rekonis tiun fakton, sed milde ridetante li aldonis al mi, ke li emas konsideri, ke en tiuj okazoj Zamenhof, eble pro influo de la slavaj lingvoj, eraris kontraŭ la gramatiko de Esperanto. Ŝajne similan sintenon komencas nun eksterigi S-ro Jung.

Ĉiu rajtas havi kaj libere esprimi lingvajn preferojn, sed neniu rajtas ŝanĝi la Fundamenton. La **at-** istoj devas do lojale diri, ke per sia praktika **at-** ismo ili volas enkonduki idiomajn -ne neologismon laŭ la spirito de nia lingvo ! —, kiun nek la Fundamento nek la zamenhofs uzado pravigas. Ke la Fundamento kaj la zamenhofs uzado devigas la agnoskon de ata kaj ita kiel aspektiloj estas io filologie pruvita de Kalocsay kaj Waringhien, ĉu tio plaĉu aŭ ne. Aserti la kontraŭon estas tro lerta artificio, ia jezuiteco, kiun honestaj samideanoj ne devus kulpi.

Stampi filologie korektan demonstradon **neobjektiva**, ĉar ĝi ne estas aparte plaĉa al kelkaj, kaj ĝin klopodi kredigi tia surbaze de lerte aranĝitaj citaĵoj el verve suka, humura stilo, nu tio estas kiel proklami teoreman demonstradon **netauĝa**, ĉar ĝi iris vojon, kiun la kritikantoj ne ŝatas aŭ ne konas. Tiaj « rezonadoj » al lertaj samideanoj aperas nur kiel retoraĵoj — milde dirite ; sed ne ankoraŭ plenformiĝintajn esperantistojn ili povas danĝere misgvidi.

Kiel Waringhien diras en **Lingvo kaj Vivo**, multaj havas sian propran muŝon en la kapo, sed saman malrespekton por nia lingva tradicio. Se ni estas esperantistoj kaj ni volas konservi la unuecon de nia lingvo tia, kia ĝin difinis la Fundamento kaj la zamenhofs uzado, estas necese, kiel Waringhien memorigas, ke ni detenu nin de ĉia intenco al ŝanĝo en la strukturo de la lingvo, kaj kiel eble plej fidele imitu la stilon de Zamenhof, laŭ la budhana devizo : « Ĉe la piedoj de la Majstro ».

Esperanto tra la Mondo



ESTONTAJ UNIVERSALAJ KONGRESOJ.

La estraro de U.E.A. elektis Harrogate (en Britujo), kiel urbon de la universala kongreso de 1961.

Principe, la estraro akceptis inviton de Japana Esperanto Instituto por kongreso en Tokio en 1965 por ilustri la tutmondecon de la movado kaj helpi al plua disvastiĝo en Azio.

Por 1961, oni pripensos modifon de la kongresprogramo por fari ĝin en kunligo kun la unua « Internacia Esperanto Artfestivalo ».

LA KAMPANJO POR ESPERANTO EN LERNEJOJ STARTAS.

Jam U.E.A. plenumis la unuajn preparojn kaj paŝojn por la nova granda kampanjo de la esperanta movado : enkonduki la lingvon en la programo multaj lernejoj tra la mondo.

— La Finnlanda Administracio de Publika Instruado sendis oficiale al ĉiuj finnlandaj lernejoj dokumentojn pri esperanto.

— Rimarkinda estas la libro eldonita de la jugoslavia Esperanto-Asocio « Esperanto kaj Lernejo ». Ĝi alportas vastan dokumentaron kaj multajn ideojn pri la temo.

— De la 15a ĝis la 25a de julio okazos en Jugoslavio (en la bela montara regiono de lago Bohinj), seminario kiu studos la problemojn ligitajn kun instruado de esperanto en la lernejoj. Informoj en « Jugoslavia Esperanto-Asocio », poŝtkes- to 275, Ljubljana.

LA UNIVERSALA KONGRESO EN BRUSELO (30-7-68).

— La L.K.K. organizos fakvizitojn en la Muzeo de Belaj Artoj, en Banko de Bruselo, en Mekanigita Poŝtoŝicejo (la plej moderna en Eŭropo).

— La programo de la Internacia Somera Universitato entenas 8 interesajn kaj tre diversajn prelegojn.

PLIAJ INTERNACIAJ RENKONTOJ.

— La Norvega Somera Semajno okazos 7-14 aŭgusto en Gudbrandsdalen, popolaltlernejo, en la mezo de la norvega montaro. Informoj ĉe : Orienta distrikto de N.E.L., Poŝtkesto 942, Oslo.

— Ferial kultur-semajno, en kastelo Münchenwiler, apud Morat (Muren), Svisujo, 7-21 aŭgusto. Prospekto : Svisa Esperanto Instituto, Breitenrainstrasse 12, Bern.

— Aŭtunaj feriaj kursoj, 16-23 oktobro, en la Sporta Altlernejo de Vejle Danlando. Petu prospekton al : S-ro L. Friis, Ingemannsveg 9, Aabyhøj, Danlando.

ALVOKO AL GEOLOGOJ.

Fondigis esperanta Geologo-klubo en Pollando. Interrilatu kun tiu klubo, Varsovio 10, Str. Jasna 6, Pollando.

NOVAJ LIBROJ EN ELDONEJO « STAFETO ».

Rimarkinda agado en tiu eldonejo kiu ĵus aperigis : « Nepalo malfermas la pordon » (Tibor Sekelj), « La bela subtera mondo » (Leander Tell), « Pinta krajono » (Poemaro de Reto Rossetti), k.t.p.

Nun, « Stafeto » eldonos en 1960, tutan serion de teatraj verkoj.

FOTO-AFIŝOJ DE UNESKO EN ESPERANTO.

Ni memorigas ke, per viaj ekspozicioj, vi povas ricevi el UEA, sendante nur 4 int. resp. kuponojn, 12 belegajn foto-afiŝojn de UNESKO kun teksto en esperanto.

MEMORLIBRO PRI LA ZAMENHOF-JARO.

De nun, mendu al UEA la memorlibrojn pri la Zamenhof-Jaro, kun interesegaj artikoloj de la plej eminentaj esperantistoj kaj multaj fotoj. Nepre neceso en ĉiuj kluboj bibliotekoj !

DATREVENO DE ZAMENHOF FESTITA EN MOSKVO.

La esperanto-sekcio ĉe la moskva urba domo de la Instruistoj organizis solenan kunsidon. Naŭ oratoroj parolis inter kiuj la lingvisto Prof. Bokarev, la verkisto Skapa (malnova kunlaboranto de Gorkij), la vietnama ambasadoro (kaj esperantisto), NGUYEN-van-KINH ; Fine, la artisto N.N. Ritkijoj deklamis.

NOVAJ ESPERANTLINGVAJ DISSENDOJ :

En « Voĉo de Ameriko ». — « Voĉo de Ameriko » decidis elsendi tri pluajn programojn en esperanto dum tri sinsekvaj vendredoj : la 24-6, 1-7 kaj 8-7 sur samaj ondlongoj.

En japana televido. — La 28an de marto, la konata eminenta esperantisto Tibor Sekelj aperis en japana televida programo.

POR FOLKLORAJ AMANTOJ.

Pri popolaj dancoj kaj kantoj deziras korespondi anoj de la jenaj folkloraj grupoj :

— grupo folkloro de Krakovio. Adreso : Zespół Piesni i Tanca « Krakowiacy », Meiselsa 18, Krakow, Pollando.

— arta grupo de jugoslavaj fervojistoj. Adreso : Sredić V. Gvozden, Kozjacka 9, Beograd.

— bulgara dancgrupo « Jordanka Nikolova ». Skribu al : Canko Murgin, Iŝkar 46, Sofia.

INTERNACIA FOIRO DE PADOVA.

Esperantlingva tradukoficejo estas je dispono de koncerna « Eksterlando-Fako », Miloj da propagandiloj dissendataj. Ankaŭ funkcias Esp-informoficejo.

AGRONOMAJ ESPERANTISTOJ.

Internacia Asocio de Agronomaj Esperantistoj serĉas kontaktojn kun ĉiuj agronomaj esperantistoj. Prezidanto : Sterjo Z. Kukuŝev, Direktoro de M. T. Stacio str. « 20 » n° 13, Peŝtera, Bulgario.

ANTOLOGIO PREPARATA.

Ni preparas Antologion de monda bonhumoro en esperanto. Pri ĝi mi serĉas kunlaborantojn en ĉiuj landoj. Adreso de la kompilanto : Metodij Pančev, Sofia 7, Str. Persenik n° 30, Bulgariujo.

GEEDZIGO.

La konstanta kongresa sekretario, Gian Carlo Figliera edzigis en Bruselo kun Ada Sikorska, redaktoro de la Pola Stacio. Plej sinceraĵojn gratulojn kaj bondezirojn.

TURISMO


Bretonio vin vokas (3)

Kaj nun tra Finistero ! Jen estas ebla vojplano, kiun vi povus elekti. Ĝi certe ne estas la sola kaj ĝin vi povus aligi laŭ via derizo aŭ laŭ ĉiuspecaj okazoj...

Pense ni staras sude, ĉe la marbordo en unu el la plej pentritaj lokoj, en la ĉirkaŭaĵoj de Penmarh. Post ĉirkaŭrigardo al la Oceano, ni survoĝigu norden... Ni rapide priskribos la ĉefajn lokojn. Vi povas iri dekstren kaj viziti la fiŝkaptan havenon Gilvinek aŭ laŭri la marbordon kaj iri al Leskonil kaj Loktudi. Sed se vi iros maldekstren vi povos iri al Tronoën kie vi vidos la plej malnovan kalvarion kaj kapelon. Poste vi vizitu Pont-L'Abbé kaj jen estas la vojo al Kombril Sta Marino, kie vi povus trairi al Benodet, la belega marbenejo. Irante rekten ni baldaŭ estos en Kemper, kiun ni traŭros por uzi la vojon al Brest.

Post unu kilometro staras monumenteto ĉe la

Tie ĉi troviĝas la lasta, la kvara kluzo... Tre longtempe Port-Launay estis prospera haveno. Ĝiaj boatoj faris ageman negocon sur la kanalo de Nantes al Brest. Sed ho ve ! la servo grave vundis ĝin ; finfine la barajo de Gerledan kvazaŭ ĝin mortigis. Du vaporsipoj daŭre kunligas ĝin kun Brest. Tiu ŝipveturado estas certe unu el la plej interesaj kaj permesas admiri la valon de Aulne kaj la tutan longon de l'Bresta Rodo. En Port-Launay vi vidos la belegan viadukton. Post kvar km. maldekstre., vojeto kondukos vin al la belega kapelo de Sta Sebastiano. Venas nun post tri km. Pont-de-Buis, kiu kaŭras ĵunde de piloreska valo de l'Dufino. Tiu urbo estas sidejo de tre grava pulbo-fabrika, kiu tiel rapide kreskis, ke nun ĝi grimpas sur ĉiujn ĉirkaŭajn montojn. Trapasante Kimer'hon, supreniru ankoraŭ unu km. ĝis Ti-Joptik el kie vi admiros ĉiudirekten belegan pejzaĝon, eĉ la rodon de Brest. El tie mi konsilas al vi suriri maldekstren la vojon al Ros-



Nobelrestejo en Kemper

(Kliso « Ouest-France »)

vojbordo ; ĝi memoriĝas la lastan batalon, kiu okazis la 8-an de aŭgusto 1944 por la liberigo de Kemper. Post alia kilometro dekstre, vidu la kastelon de Koutbili, kie antaŭ jam tre longe loĝis bruemaj Koboldoj. Ho ve ! kien ili foriris ? ni reeniru ! Post dek kilometroj haltu momenton. Ĉe la vojo admiru dekstre la kapelon de Kilnen kaj ĝian kalvarion. Ĉi tiu eble ne estas tre konata... Malprave... Ĝi estas unu el la plej belaj kaj elegantaj ! Du aŭ tri kilometrojn pli malproksime, jen la kapelo de Sta Venek. Baldaŭ ni estos en Chateaulin. Poste je tri km., Port-Launay, pentrita urbo, kanalhaveno, kiu kuŝas laŭ agrabla kurbajo ĉe la bordo de l'kanaligita rivero Aulne, ĉe la piedo de arbkovrita kaj agrabla monteto.

noën, kiu nur estas eta vilaĝo sed kiom agrabla ! El sudo vi ekvidos la valon de Aulne kiun superstaras la monto Menez Hom (331 m.), kiu kolore kaj forme similas al giganta elefanto.

La panoramo estas bela kaj vasta tie. Nun okcidenten ! Tiu vojo permesas al vi admiri dum pluraj km. la belegan valon. Jen la ponto de Terenez, 347 m. longa, unu el la plej longaj pontoj (pendpontoj) en Eŭropo. Fatigita dum la milito, ĝi estas riparita. Daŭrigu malsupren vian vojaĝon. Post agrabia vojturniĝo vi preterpasas antaŭ Landevenec, kredeble unu el la belaj anguloj de l'ŝurtera paradizo. Tie Guenolé ĉirkaŭ la 5-a jarcento konstruis sian monaĥejon. Nuntempe oni estas rekonstruanta ĝin.

Norda



Tiu regiono, kiu, dum la jarcentoj estis la ŝildo de Francujo, estas ankaŭ ĝia krono. Al kampkulturado kaj industrio ĝi aldonas originajn turismajn, intelektajn kaj artajn riĉaĵojn. Sur la lando de la minejoj kaj de la metalurgio, de la biero kaj de la teksado, naskiĝis Froissart kaj Comines, Watteau kaj Carpeaux, Sainte-Beuve kaj Marceline Desbordes-Valmore. La Nordo estas la « lando de laboro kaj revo » diris la poeto A. Prouvost kaj « Lille, la potenca metro-polo de la laboro el kiu elsprucis la tri kantoj : Petit Quinquin, La ĉeriz-tempo, kaj La Internacio, estas la nura urbo en la tuta mondo kie oni ankoraŭ konstruas katedralon ».



« Kapo el vakso »

Muzeo de Lille

Foto Eblagon, Tourcoing

FRANCUJO


En la departemento Nord oni ŝatas la ĝardenojn. Oni ŝatas ilin kaj oni kreas multajn. Prome-nu en Lille, Roubaix, Douai, Cambrai, Valenciennes, Hazebrouck : certe vin allogos la belegaj parkoj. Maubeuge nomiĝas la « urbo de la floroj » kaj Lambersart « la belulino ». Super tiuj ĝardenoj vidiĝas la belfridoj, fieraj simboloj de la urbaj liberecoj. Iliajn sonorilojn la poetoj kaj la pentristoj gloris.

Sur la marbordo kuŝas labor - kaj pac - havenoj : Dunkerque, naskiĝloko de Jean Bart, Bray, Malo-les-Bains, Gravelines. La flandraj ebenaĵoj, granda senmova maro, kiun pligrandigas la oceano de la nuboj estas ne priskribebaj allogaĵoj ĉefe kiam oni ilin superrigardas de la Flandraj Montoj : Cassel, Mont des Cats, Mont Noir. Modernaj vojoj ilin trakuras, kanaloj ilin trafluas.

Lille estas la ĉefurbo de tiu regiono, vere ekonomia kaj industria bastiono. Ĝi posedas unu el la plej belaj provincaj muzeoj kun primitivaj pentraĵoj kaj multaj konstruaĵoj de la XIII-a ĝis XVII-a jarcentoj. En sia muzeo Valenciennes prezentas la plej grandan parton de la pentraĵoj de Carpeaux kaj Watteau ; Le Cateau kreis Matisse-muzeon. Oni ankaŭ povas admiri la « muzeon de la punto » en Bailleul, la industrian muzeon en Lille kaj la teksaj-muzeon en Roubaix.

Oni ofte aldonas al la vorto « Nord » la adjektivojn « nigra ». Sed la vizitanto rapide konstatas ke dank'al siaj arbaroj la departemento Nord estas fakte « verda ». La restado en Avesnois kaj Thierache estas agrabla kaj eĉ ĉirkaŭ la industriaj urboj, kiel Fourmies, etendiĝas vastaj verdaj spacoj. Apud la arbaroj multaj lagetoj proponas akvo-plezurojn kaj ludojn. Alia kuriozaĵo en tiu regiono estas la multaj mueliloj, kiujn verkisto nomis « la domoj de la pano ». Ili kuniĝas kun la tremanteta foliaro kiu superrigardas la vastajn kampojn en la granda paco de la norda ĉielo.

La departemento Pas-de-Calais, okcidente de la departemento Nord ĉiam konservas la memoron de Azincourt kaj de la tiel nomita « Tendejo de la Ora Drapo ». La abatejoj, la belfridoj, la



Laon : La Katedralo

kasteloj estas la restaĵoj de la iamaj vivo kaj batalo. Enlande troviĝas kvietaj urbetoj, kaj ĉiuj urbetoj posedas belajn malnovajn konstruaĵojn, ĝardenojn ; ĉie la kamparo prezentas al la okulo de la vizitanto vidindaĵojn. Sur la marbordo la havenoj estas multaj, ĉiuj viglaj, ĉiuj prosperplajn.

Arras, kies pasinteco estas gloriplena, posedas multajn fabrikojn. Kelkaj kvartaloj konservis malnovan aspekton kaj ĉefe ĝiaj du fame konataj placoj kiujn belega belfrido superstaras. Saint-Omer, malnova urbo situanta sur la rivero Aa fieriĝas pro gravaj art-riĉaĵoj. Ĝia katedralo ĉiunokte vivigas per sono kaj lumo. Ĝia biblioteko entenas nekompareblajn manuskriptojn kaj altvalorajn bele ilustritajn inkunablojn.

La strandoj estas multaj kaj multe vizitataj : Calais, Wissant, Gris-nez, Ambleteuse, Winereux, Boulogne, Le Portel, Le Touquet, Merlimont, Berck kaj aliaj. De Le Touquet kaj Calais regule ekflugas aviadiloj al Britujo kaj de Calais kaj Boulogne ekras pasaĝer-ŝipoj.

La kamparo en tiu regiono estas verda, monteta. La horizonto fandiĝas en la ĉielon kaj

ĉie la panoramo, la malgrandaj preĝejoj kaj kapeloj invitas la turistojn al vizito.

Sude de la departemento Nord kuŝas la **departemento Aisne**. Amiko, kiu trairas tiun departementon, malrapidu kaj rigardu. Tie la lando estas riĉa je gloro, sango kaj harmonio. Tie kuŝas la verda Thierache kun pomarboj, heĝoj, dikaj herbaĵoj kaj milda ĉielo. Ĝiaj arbaroj plidaŭrigas la malhelajn Ardennes kaj ĝi ofertas al la vizitantoj sian pasintecon per siaj fortikigitaj preĝejoj, siaj suferintaj vilaĝoj, per la memoro de siaj irlandaj monaĥoj, terkulturistoj kaj konstruintoj de la abatejoj.

Du vojoj al Parizo trairas la departementon Aisne.

La valo de la rivero Oise, kiu de Hirson al Chauny, malrapide vagas tra herbejoj kaj arbaretaj. Entranĉinta la riĉan Vermandois la urbo Saint-Quentin montras al la turistoj belegan urbodomon, interesan muzeon entenantan la akvopentraĵojn de Quentin-Latour, kaj glorajn sed funebrajn memorojn.

La alia vojo (Nationale 2) tra Vervins, ĉefurbo de la regiono Thierache, kaj tra Marle fuĝas al Laon. La kamparo anstataŭas la boskojn, kaj alte staranta sur ĝia monteto, belega, Laon aperas ĉe la horizonto. Irante de Belgujo aŭ Nederlando al Parizo, de Britujo al la Lazura marbordo aŭ al Svisujo, de Skandinavio al la suna Sund, aŭ, tute simple, trairante Nordan Francujon, via vojo trapasos Laon, aŭ almenaŭ pasos tre proksime. Vin invitos la kvar turoj kaj la bovoj de ĝia katedralo, ĝia malnova episkopa palaco, ĝiaj malnovaj pordoj, ĝiaj remparoj kiuj elŝprucas el la verdaj ĉirkaŭantaj la mezepokan civiton. Supreniru tiun monteton kaj admiru la katedralon. Malrapide laŭiru la mallarĝajn stratojn, piede vagu ; tiel vi vidos mirindaĵojn.

Sed Laon, jam estas en Ile de France, kaj ĝia delikata ĉarmeco. Tion oni vidas en la arbarkovritaj ondoj de la reliefo en kiu sin kaŝas vilaĝoj kaj abatejoj speguligantaj en la trankvilaj akvoj de laĝetoj. Staranta super la rivero Oise, vundita sed fiera je sia antikva gloro, jen Coucy. Sur la rivero Aisne, Soissons kaj ĝia legendo, ĝia historio, ĝia katedralo, ĝiaj ruinoj, ĝia eleganta harmonio parolas al la spirito kaj al la koro. Aliaj kasteloj : Septmons sur la rivero Crise, Fere en Tardenois sur la rivero Ourcq kaj Montmorency. Tie, ĉe la fonto de la rivero Automne, en Villers-Cotteret, kie Alexandre Dumas pasigis sian infanaĝon, la malnovaj francaj reĝoj, Capetiens kaj Valois, loĝis ĉar ili ŝatis la altajn ĉasaj-plenajn arbarojn kaj la vojoj kiuj tra la arbejoj, kondukas al la cisterciana abatejo de Longpont kaj al la Ferté-Milon, naskiĝloko de la fama verkisto Racine. Pli sude fluas la rivero Marne, kaj tra la

vitejoj, kiu kovras mezaltajn montetojn la vojaĝanto fine atingas Château-Thierry, naskiĝloko de alia famega verkisto, La Fontaine.

Ni nun iros okcidenten kaj vizitos la regionon Picardie, **departementon Somme**. Tiu regiono estas ege pitoreska kiam oni komprenas ĝian apartan karakteron. Ĝian kretcan grundon kovras produktema ŝlimo. Kvietaj riveroj trafluas la plataĵojn. En la valoj staras iamaj fortikaj urboj nun pacoplenaj komercaj urboj. El tiuj ni citu la ĉefurbon Amiens. Tiu urbo estis rekonstruita post la lasta mondmilito laŭ moderna stilo, sed ĝi konservis sian mirindan ogivartan katedralon. Ĝiaj portaloj sugestis al John Ruskin « La Bible d'Amiens », tradukita franclingven de Marcel Proust. Amiens estas fama ankaŭ pro siaj veluroj, siaj anas-pasteĉo, siaj makaronoj. Ĝia muzeo posedas pentraĵojn de la flandra skolo kaj de la XVIIIa jarcento kaj multajn aliajn. La « surakva » vendejo estas ege pitoreska. Forrante ni dediĉu pensojn al Branly kaj P. Bourget kiu naskiĝis tie kaj al Jules Verne kiu tie mortis.

Tro rapida estis nia vojaĝo, ni nur esperas ke ĝi instigos vin, kiu trapasas Nordan Francujon, vin kiu vizitos la Universalan Kongreson en Bruselo, al vizito de tiu parto de Francujo. Al nia invito ni aldonos la jenan leteron kiun ni ricevis de samideanino, kiu loĝas apud Roubaix, Tourcoing.

Kara amiko,

Mi tre ĝojas, ke vi volas restadi ĉe ni, dum tri tagnoktoj, antaŭ aŭ post la kongreso de Bruselo.

Pri la vidindaĵoj de mia regiono, mi devas unue konfesi, ke mi mem konas nur parton de Norda Francujo, t.e. la industria centro Lille-Roubaix-Tourcoing. Kiel vi certe memoras el via lerneja tempo, estas tre multaj lan-kaj tekstil-fabrikejoj en Roubaix-Tourcoing. Fakte 45 % el la tuta laborantaro havas okupon en tiu-ĉi branĉo.

Post Reĝino Elisabeth kaj S-ro Krouchtchev (Kruĉov), vi eble ŝatos viziti gravan lan-fabrikon, kiel « La Lainière ». Mi provos havi la necesan permeson.

Se vi interesiĝas pri la ĉiutaga vivo de la tiea enloĝantaro, ni povos viziti modernajn kvartalojn, helajn loĝejoj kaj, kontraste, unu el la multaj « kortoj » de Roubaix, kun mizeraj dometoj, mal-konstruataj.

Je la dua tago, ni promenos tra la tre bela parko « Barbieux » kaj marŝos ĝis la tute nova preĝejo « Sankta Terezo », nepre vizitinda pro ĝia moderna stilo kaj arta interna aranĝo.

La trian tagon, ni dediĉos al la proksima marbordo, ĉu franca, ĉu belga, kie estas belaj strandoj. Ankaŭ eblas viziti nian « ĉefurbon » Lille. Apud la komercaj stratoj, ni vidos belajn historiajn fasadojn, la belfridon, la grandegan « hospitalan civilon », ktp.. Se pluvos (tio okazas), Unika kolekto da valoraj pentraĵoj atendas vin ĉe la arta muzeo de Lille...

La lokaj delegitoj de la Universala Esperanto Asocio kaj la koncernaj turism-oficejoj certe sendos al vi detalajn informojn pri la plej interesaj urboj de Norda Francujo.

Por plibone koni mian regionon, mi partoprenas, plej ofte eble, la amikajn kunvenojn, kiujn organizas la Franc-Norda Esperanto Federacio. Inter la urboj elektitaj de la estraro, ni notu lokojn tiel diversaj kiel : AMIENS, SAINT-OMER, LENS, BOULOGNE, DUNKERQUE, BOURBOURG, ktp... ĝis baldaŭ,

Sincera via...

Lille : Pordo de Parizo



EL LA KULTURDOMO




Du Mondfamaj Francaj verkistoj : HONORE DE BALZAC kaj ANATOLE FRANCE

Lastan jaron, la Kulturdomo prezentis dum siaj « Kulturaj Ferioj », la verkistojn de la Liĝera Valo, dank'al prelego de S-ro Watier. Ties sukceso kaj la intereso, kiun ĝi naskis, instigis nin paroli pli longa pri la pli famaj el tiuj verkistoj. Ĉi-jare, ni elektis inter ili, du el la pli elstaraj francaj aŭtoroj : Honoré de Balzac kaj Anatole France. Ties vivoj kaj verkoj estos temoj de prelegoj dum venonta Julio.

Honoré de Balzac naskiĝis en Tours en 1799, kaj mortis en Parizo en 1850. Lia verkaro, titolita « La Homa Komedio » estas giganta kolekto de ĉirkaŭe unu centon da romanoj kaj noveloj priskribantaj la francan socion de la XIX a jarcento, kaj estas verkita nur en la daŭro de dudek jaroj !

La tuto estas dividita en tri kategorioj : Moraj Studoj, Filozofiaj Studoj, Analizaj Studoj. La unua,



Dormĉambro de Anatole France en « La Bechellerie »
(Kliso « Nouvelle République »)

tre ampleksa, estas subdividita en : Scenoj de la privata vivo, Scenoj de la Provinca vivo, Scenoj de la pariza vivo, Scenoj de la politika vivo, Scenoj de la militista vivo, Scenoj de la kampara vivo. Balzac nomis ilin « La fundamento de la konstruaĵo ». La dua kategorio konsistas el filozofiaj romanoj kaj noveloj kaj mistikaj romanoj. La tria preskaŭ konsistas nur el unu romano : « Fiziologio de Geedzeco ».

La ĉefaj karakterizoj de la Balzaca verkaro estas : unueco kaj realeco.

— Unueco : en tiu vasta societo, kiu svarmas tra la verko, aperas la samaj figuroj — personoj, centra temo de unu romano, reaperas epizode, kiel flankaj figuro, en aliaj romanoj, tute same kiel, tio okazas en la vivo ĉiutaga. Tio donas al la tuta verko, neegalitan vivecon ;

— Realeco : la personoj agas vere, kiel ili *devas* agi, laŭ sia karaktero, sia kulturo, sia vivmedio. La abundo de trafaj detaloj, la zorgema precizeco de la priskribo de la loĝejoj, de la meblaro meze de kiuj, vivas la roluloj de tiu « komedio », eĉ de iliaj vesta-



Kastelo de Sache - Muzeo Balzac
(Kliso « Nouvelle République »)



Anatole France

joj, estas tiom akurata, ke la personoj vere vivas antaŭ la okuloj de la leganto, kaj havas realan aktualacon.

La influo de Balzac estis grandega. Oni povas aserti, senerare, ke li estas la kreinto de la moderna romano. Ĉiuj verkistoj, samtempaj kaj postvenintaj ricevis lian influon, ne nur en Francujo, sed ankaŭ en la aliaj okcidentaj landoj. Ĉiuj genroj de romano: politikaj, aventuraj, historiaj, psikologiaj, amaj, filozofiaj, ŝuldas ion al la « Homa Komedio ».

Anatole France naskiĝis en Parizo en 1844, kaj mortis en « la Bachelierie », proksime de Tours en 1924.

Lia genio estas multfaceta. Li estis, iel diletanto, kiun allogis ĉiuj formoj de la beletra arto. Tial, lia verkaro estas tiel diversa, kiel estas la diversaj literaturaj fakoj. Ĵurnalisto, poeto, dramisto, romanisto, historiisto, filozofo, li verkis kun sukceso, en ĉiuj genroj. Lia stilo, flua kaj simpla estas elstare bela, kaj trafenetrata de la klasika kulturo.

Sincere ateisto, li omis al afabla, bonvolema skeptikismo. Liaj idealoj estis: plena libereco por ĉiu, kaj socia justeco. Pro ili, li sin ĵetis en la politika batalo, kaj fariĝis militanta socialisto. Post la skismo, kiu apartigis socialistojn kaj komunistojn, li subtenis la junuan komunistan partion. Ne longe poste, li forlasis ĉian politikan agadon.

Komentata legado de la pli belaj paĝoj de Honoré de Balzac kaj Anatole France ebligas niajn samideanojn konatigi kun la genio de tiuj du senkomparaj verkistoj. Ekskurso al la lokoj, ie ili vivis dum kelka tempo, agrable kompletigos niajn prelegojn. Kaj veturante al la kastelo de Saché, plena de la memoro de Balzac, kaj al la Bachelierie, kie France travivis siajn lastajn jarojn, ni vizitos plej vidindan parton de tiu bela lando, fama pro siaj allogaj pejzaĝoj kaj siaj multaj belaj kasteloj, en kiu staras Grésillon.

E. MOTILLON.



EN GRÉSILLON

Simpatia grupeto
babiladas en la salono

Staras S-ino Haudebine
nun en Hindujo

Sidas maldekstre
Ge-roj Micard

El ie en la Mondo

AŬTUNE TRA ISRAELO

Marie Ginzova el ĉeĥoslovaka ĉefurbo Praha, nun — post sia foriro al Israelo — Mirjam Ginz, informas la esperantistan klubon en Praha de tempo al tempo pri sia nuna ŝanĝita vivo. Ni represas unu el ŝiaj raportoj.

Kvankam mi estas en Israelo jam pli ol tri jarojn, oni konsideras nin ĉiam ankoraŭ novaj enmigrintoj. La registaro zorgas, ke tiuj novuloj konatiĝu kun la lando, kun ĝia aspekto, kun ĝiaj bezonoj kaj problemoj, ke oni ekamu ĝin, kiel oni amas sian patrujon.

En finaj semajnoj de oktobro, en agrabla vojaĝsezono antaŭ la grandaj pluvoj, preparis la lokaj instancoj tian arangon kaj kiam oni nin, mian edzon kaj min, demandis, ĉu ni volas partopreni, ni kun ĝojo konsentis. Felice — aŭ malfelice — ni ne havas konstantan regulan okupon kaj tial ni povis simple fermi nian dometon kaj foriri. Ni ne bezonis fari specialajn preparojn, ĉar oni promesis zorgi pri ni komplete. Nur iom da tolaĵo ni kunprenis, sciante, ke ni forestos preskaŭ tulan semajnon. Oni rekomendis al ni speciale ne forgesi banvestaĵon.

La 24-an de oktobro ni startis en komforta aŭtobuso nian grandan vojaĝon. Ĝia komenco estis tutaĝa vizito al nordo de Israelo. Ni eliris el nia Kirjat Jam, kuŝanta en Golfo de Haifa, rekte norden. Ni preterveturis la antikvan urbon Akko, la romian akvedukto, la banlokon Naharia kaj rapidis ankoraŭ pluen en la sama direkto. Maldekstre fervojaj reĵoj, sub ili roka marbordo kaj plu nur la blua maro. Fine ni atingis lokon, kie monto baris pluan progresadon kaj ni komprenis, ke ni proksimiĝis al limo de nia lando. Ni forlasis la aŭtobuson, pasis grotojn kaj truojn alte sur la monto, pri kiuj nur Dio scias, kiel ili kreigis kaj pri kiuj oni rakontis al ni interesajn fabelojn. Poste ni trairis tunelon, tra kiu daŭris la fervoja linio. Elirinte el la tunelo, ni havis antaŭ niaj okuloj mirindan spektaklon: rokajn klifojn atakas furiozaj marondoj, alten flugas ŝaŭmo kaj sur nin falas delikataj gutetoj. Sub niaj piedoj, sub malgranda ponteto, la maro ekboris la monton kaj profunde en ĝin enpenetris. El tiu profundajlo venas kaj en ilin denove revenas kirlantaj kaj muĝantaj akvaj amasoj. Kontraŭ tiu senbrida elemento ŝajnas al ni la ponteto nesufiĉa sirmo. Ni tre rapide transiras ĝin, ni vidas antaŭ ni interrompitajn reĵojn kun aliaj rompigitaj feraĵoj kaj ni staras antaŭ dua tunelo. Ni devas halti, ĉar ĝia alia elirejo estas en Libanono. Iam veturis tie fervojo ĝis Beirut.

Ce l'piedo de la monto atendas nin nia aŭtobuso. En kapturna alteco super ni flirtas Israela flago apud iaj ŝtonaj konstruaĵoj. Mi ŝerce diras al mia edzo: « tien ni povus veturi per nia aŭtobuso! » Nekredible, sed el mia ŝerco iĝis vero: jen, nia aŭtobuso ekgrimpas, ne daŭras tre longe kaj ni estas apud la flago. Tie supre, la ŝoseo daŭras en norda direkto, sed ni ne povas antaŭiri. La ŝtata flago kaj ĉeesto de soldatoj al ni komprenigas, ke ni estas ĉe la limo. Strangaj sentoj min plenigas. Kelkajn paŝojn de ni estas homoj, kiujn oni instigis vidi en ni

« malamiko », kvankam la naturo kaj komunaj interesoj ordonas, ke ni estu bonaj najbaroj.

Ni turnas nin kaj sekvas nun preskaŭ daŭre la suprojn de la monto. Se ni foje malsuprenigas ion, ni tuj denove direktas nin alten laŭ la sen-nombraj kuraĝaj serpentumoj kun ĉiam novaj surprizaj panoramoj. Ni estas alte en la montoj ĉe la apudlima kibuco kooperativa vilaĝo Hanita kun malgranda muzeo de arĥeologiaj elfosaĵoj. Ĉirkaŭe ĉie karojoj kun siaj largaj branĉoj. La unuan fojon ni per propraj manoj ŝiras ĝiajn legumenojn. En aŭtobuso, kiam la edzo sidas denove apud mi, montriĝas, ke li havas plenajn poŝojn da ili. Ne estis malagrabla maĉi ilin dum plua vojaĝo.

Vidalvide de Hanita, sur alia monto, kuŝas Pekiin. La ŝoforo, kiu estas samtempe nia klera, plej informita gvidanto, klarigas, ke Pekiin estas la sola loko en Israelo, kiun la hebreaĵoj neniam forlasis. Ili sukcesis resti tie de la tempoj, kiam tuta Palestino estis loĝata de hebrea popolo, elteninte ĉiujn persekutojn. Nun nur unusola hebrea familio vivas tie, cetero loĝas en la loko araboj kaj druzoj.

Survoje al Pekiin ni rimarkis, kiel en profunda roka valo sin ŝovas rapide antaŭen multcentkapa grego de nigraj kvarpiedaj bestoj. Ili kuris kaj saltis, iam provis halti en ombro de grandaj ŝtonblokoj, sed estis petitaj ĉiam antaŭen de kelkaj homoj, kiujn ni rekonis kiel arabojn laŭ iliaj blankaj tukoj kun nigraj ringoj surkape. Kiuj estas la bestoj, ni ne povis tiam distingi pro la granda distanco. Ni tamen kunvenis kun bestoj de evidente sama speco denove en Pekiin. Enirinte tiun vilaĝon, ni trovis grandan grupon de ili proksime de la vojo. Sur malgranda alfajo ili kvazaŭ atendis nin. Ili staris kaj kuŝis tie dense unu apud la alia, senmove kaj scivole nin observante. Ankaŭ ni ilin rigardas, nun de proksimo, kaj ni trovas, ke estas verŝajne nigraj kaprinoj, tre similaj al ŝafoj, kun longegaj, malsuprenpendantaj oreloj. Pekiin mem estas primitiva vilaĝo, konsistanta el ŝtonaj domoj. En ĝiaj mallargaj strategoj ni devas bone atenti, ke ni ne rompu niaj krurojn aŭ ne falu en malpurajn. Arabinoj kaj iliaj infanoj proponas ĉie survoje plaĉajn multkolorajn korbeĵojn. Ni observis ilin ankaŭ; kiel ili plektas tiujn korbeĵojn el pajlo.

En Pekiin ni kunvenis kun la solaj hebreaĵoj tie loĝantaj. Ili zorgas pri tiea templo, kiun ni eniris. Estas tie enmasonitaj kelkaj reliefoj, laŭ supozo portitaj tien el la Jerusalema templo de Salomono. En la vilaĝo ni observis de proksime la vivmanieron de araboj kaj iliajn hejmojn. Guste antaŭ ni eniris arabino en la ĉambron kune kun sia azeno, sendube ŝia kunloĝanto. En lu nigra truo ni en la mallumo malfacile distingis iajn vardojn, pendantajn sur la muroj aŭ kuŝantajn sur ŝtona planko. Estis butikoj. Daŭros certe multe da tempo ankoraŭ, antaŭ ol tiuj ĉi araboj decidigos ŝanĝi la manieron de sia vivo kaj siajn praantikvaj kutimojn.

MIRJAM GINZ (daŭrigota).

GRAMATIKAJ RESPONDOJ

NE VORTOJ, SED FRAZOJ

Antaŭ nur 50 jaroj, ankoraŭ malmultaj instruistoj pri lingvoj konsentis, ke ili devis lernigi precipe frazojn, ne vortojn.

Komence, temu pri plej mallongaj kaj simplaj frazoj tuj uzebaj : **bonan tagon, ĝis revido, blanka papero, nigra inko, ruĝa krajono, bela virino, forta vivo, alta monto, mi estas Johano Rodrigues, ŝi estas Johaniĝo Peterson, la tablo staras sur la planko, la libro kuŝas sur la tablo, la kato kuŝas sub la tablo, mi sidas sur la ŝego, ktp.**

En frazoj vivas kaj difiniĝas la vortoj, kaj tial oni lernas ilin pli facile kaj efike. Sed antaŭ nur duona jarcento, plej multaj instruistoj pensis, ke per gramatikaj reguloj kaj serioj aŭ listoj da vortoj, ili povis lernigi fremdajn lingvon. Eĉ en la logika Esperanto, tia metodo ne estas deca, trafa, ĉar la lernanto faros tiam per la vortoj, la esperantaj frazojn, ne laŭ la spirito kaj logiko de la nova lingvo sed de sia nacilingvo. Italo salutis per **kiel al vi iras** ? Germano : **kiel iras ĝi al vi** ? Anglo : **kiel faras vi faras** ? Francio : **kiel vin portas vi** ? Hispano : **kiel estas vi** ? ktp., anstataŭ **kiel vi fartas** ?

En franca lingvo, se ne en frazo, kie ĝia senco feli preciziĝas, kion signifas ekze, **bout** ? en angla, **set** ?

Neniu ordinara hispano, anglo, germano, povas fari francajn frazojn. Ekzistas — korektaj, naturaj — nur tiuj faritaj de la franco ; kaj nur per tiuj frazoj devas paroli fremdulo, se li volas esti komprenata de francoj.

Ne laŭ la nombro da vortoj, sed da frazoj, oni povas paroli fremdajn lingvon komprenebla, oni povas deĉe ĝin paroli.

Eĉ se oni posedas klarajn konceptojn pri substantivo, akjektivo, adverbo, ktp., oni ne povas flue esprimi sian penson, se oni samtempe devas atenti la gramatikan kategorion de ĉiu vorto uzata, uzota, uzenda. Francaj knaboj korekte, « gramatike », uzas ekze-**gai, gaieinent, gaieté** antaŭ ol ili lernis, kiu el tiuj vortoj estas akjektivo, adverbo aŭ substantivo, ĉar ili aŭdis, komprenis, asimilis, unue la esprimojn **jouer avec gaieté, jouer gaieinent, visage gai**, t.e., ludi kun gajo, gaje ludi, gaja vizaĝo.

Ju pli multaj korektaj frazoj lernitaj de vi, des pli multe vi povos deĉe esprimi ideojn, kaj despli

senteblaj fariĝos la gramatikaj kategorioj por spontana aplikado de la finiĝo o al substantivoj, a al adjektivoj, i al verboj, e al adverboj.

Nur kiam ekzistis jam multaj gravaj verkoj en Esperanto, oni povis sufiĉe analizi por fari, eltiri, plenan gramatikon de nia lingvo kaj plenan vortaron kun certa precizigo pri uzoj de ĉiu vorto.

Multe legu bonajn verkojn, kaj en la Plena Vortaro la frazojn praktike klarigajn pri la sencoj de ĉiu vorto. Tiel vi penetros la faktan gramatikon — bazo por kompreni la teorian gramatikon, kiam vi legos ĝin. Jen pedagogia orientado por moderna lernado kaj instruado de la Zamenhofa lingvo, kaj de ĉiu lingvo.

Waringhien, eminenta esperantologo, trafe diris, ke sen kreita lingvo, kreita de Zamenhof per tradukado de ĉefaj verkoj el la grandaj literaturoj, Esperanto estus pala teoria fantomo, kiel multaj aliaj projektoj de lingvo internacia. Se vi volas fariĝi vera klerulo kaj lertulo en Esperanto, legu ne nur frazojn sed la tutan verkaron — la originalan kaj la tradukan — de Zamenhof.

Se vi volas rapide lernigi lingvon, memoru ke unuopaj vortoj estas nur vortoj senrilataj, senvivaj ; ke, si lernigas frazojn, vi lernigas ne nur vivantajn vortojn, sed praktikan, vivantan gramatikon — lingvon.

Kaj la lingvon kreadas kaj evoluigas ne la gramatikistoj aŭ leksikologoj, sed bonaj verkistoj oratoroj, kiuj klopodas plej multe esprimi ĉiam pli bele kaj pli klare. La gramatikistoj nur konstatas kaj konstatigas la lingvajn fenomenojn. Do, ĉiam : unue la lingvo, poste la gramatiko, ĉu en elementa grado, ĉu en supera.

D. DALMAŬ.

Membro de la Akademio de Esperanto.

GELEGANTOJ

Ni ŝatas viajn aprobojn

Ni multe ŝatas viajn abonojn

FANTAZIAĴOJ

ANTON PAVLOVIČ ĈEHOV

A. P. Ĉeĥov naskiĝis le 17-an de januaro 1860, en Taganrog. Lia avo estis servutulo, kiu ŝparis necesan monsumon kaj aĉetis sian liberon. Komence A. P. Ĉeĥov studis en Greka lernejo, poste en Taganroga gimnazio; sed, ekde la jaro 1879 li frekventis Moskvian Universitaton por studi Kuracarton. Literaturon li ekstudis komence de 1880. Li verkis multnombrajn mallongajn rakontojn kaj kelkajn teatraĵojn, el kiuj la plej famaj estas: « la tri fratiĵoj », « la Cerizarbaro », « onkio Vanja » kaj « la Mevo ». De antaŭ longe li suferis pro tuberkulozo kaj forpasis la 3-an de Junio 1904.

Por festi la datrevenon de la naskiĝo de Ĉeĥov ni prezentas mallongan rakonton de tiu verkisto tradukita de nia kunlaboranto P-ro R. Martin.

— o — o — o — o —

ĜOJO

★

Estis la dekdua nokte.

Mitja Kuldarov, ekscitita, kun distaŭzitaj haroj, kuregante eniris en la apartamentojn de siaj gepatroj, jam enlitiĝintaj, kaj rapide trairis en la tuta ĉambro. Lia fratino, kuŝanta en lito estis finanta legadon de lasta romana paĝo. Liaj fratoj, lernantoj en la gimnazio, estis dormantaj.

— De kie vi venas? diris la surprizitaj gepatroj. Kio maltrankviligas vin?

— O! ne demandu! Mi ne esperis tion! Ne, mi tute ne esperis tion? Estas eĉ nekredible!

Mitja ekridetis, sidigante en brakseĝon, ĉar li estis tiel goja ke li ne kapablis restadi sur siaj piedoj.

— Estas nekredible! Vi ne povas imagi. Ekrigardu!

Lia fratino elsaltis el sia lito, surmetis litkovrilon, kaj rapidis al siaj fratoj. La du gimnazianoj ekvekiĝis.

— Kio maltrankviligas vin? Vi ja ne estas vi mem!

— La kaŭzo estas mia gojo, Panjo. Nun ja konas min la tuta Rusujo! Tuta! Ĝis nune, nur vi sciis, ke en tiu-ĉi mondo ekzistas Dmitri Kuldarov, sed nun la tuta Rusujo scias pri tio. Panjo! O, Dio!

Mitja, saltetante, trakuris tra ĉiuj ĉambroj kaj residiĝis.

— Kio do okazis, diru klare!

— Vi vivadas tiel, kiel sovaĝaj brutoj, vi ne legas ĵurnalojn kaj ne atentis publikaĵojn; tamen, vi povus trovi en ĵurnaloj ĉiajn interaĵojn, tiel frue konigataj, kiel okazantaj. Ĉio estas malkaŝita. Kiel mi ĝojas! O Dio! Nur pri famuloj oni presas en ĵurnaloj, kaj tamen oni presas pri mi!

— Kion vi diras? Kie?

La Paĉja vizaĝo paligis. Panjo ekrigardis la sanktajn bildojn kaj krucosignis. La du gimnazianoj ellitiĝis kaj surhavante nur siajn noktajn ĉemizojn rapidis al sia unuenaskita frato.

— Jes ja! Pri mi oni presis! Nune, pri mi, la tuta Rusujo scias! Vi, Panjo, konservu tiun ĉi numeron kiel memorajon! Ni relegos ĝin kelkfoje. Ekrigardu!

Mitja elprenis el sia poŝo la ĵurnalnumeron, donis ĝin al sia patro kaj per fingro montris iun lokon, ĉirkaŭita per blua krajonstreko.

— Legu!

La patro metis siajn okulvitrojn.

— Legu, mi petas!

Panjo ekrigardis la sanktajn bildojn kaj krucosignis. Paĉjo tuis kaj komencis legadon.

« La 29an de decembro, je la dek unua vespere, Dmitri Kuldarov...

— Vi vidas, ĉu ne? Daŭrigu pluen!

... Dmitri Kuldarov elirante el drinkejo, kiu situas ĉe la strato Malaja Bronaja, en la domo de Kozikin, kaj estante en tute ebria stato gulfitis sub la ĉevalon de en tiu loko staranta kamparana flakristo de l'vllaĝo Durikana, Ĵukovska distrikto, Ivan Drotov. La ekterurigita ĉevalo piedpremane Kuldarov'on kaj trenante sur lia korpo la glitveturilon, sur kiu sidis la Moskva vendisto Stepan Lukovin, tragalopis la straton kaj estis haltigita de la pordistoj. Kuldarov'on, dume, en senkonscia stato, oni transportis al la kvartala policojo kaj detale li estis pririgardita de kuracisto. La bato, kiun li ricevis sur la nuko...

— Mi spertis ĝin kaŭze de la timono, Paĉjo. Pluen! Vi legu pluen!

... Kiun li spertis sur la nuko estas taksita ne grava. Pri la afero protokolo estis redaktita. La vundito ricevis kuracistan helpo...

— Laŭ ordono, mian nukon oni lavis per malvarma akvo. Vi bone legis, nu? Ĉu vi imagas? Nun, la afero iros tra la tuta Rusujo. Donu al mi la ĵurnalon!

Mitja subite prenis kaj faldis tiun ĵurnalon; ĝin li enŝovis en sian poŝon.

— Mi alkuros al Makarov por ĝin montri al li; mi devas ankoraŭ montri ĝin al Ivanicki, Natalia Ivanovna, ...mi rapidos! Ĝis revido!

Mitja surmetis sian kasketon kun kokardo kaj triumfa, goja, li ekkuris sur la straton.

El rusa lingvo tradukis
ROBERT MARTIN.

POR VIA DISTRO

Nia konkurso

LISTO DE LA GAJNINTOJ

- | | |
|--|---|
| 1. — S-ro Petras Kaltenis
U.S.S.R., Litovio, Kaunas 5
Kapsu 23-1 | 161 poentoj (estis la
maksimumo atinge-
bla) Korajn gratu-
lojn. |
| 2. — S-ro Nils Hedgren
Brodgränd 21, Hågersten
Svedujo | 154 poentoj. |
| 3. — S-ino W. Laurie
6, Malborough Road
Bournemouth, Anglujo | 150 poentoj. |
| 4. — S-ino Guinot
31, rue de Vergennes
Versailles (S.-et-O.) | 146 poentoj . |
| 5. — S-ro Maurin
279, avenue de la République
Caudéran (Gironde) | 141 poentoj. |
| 6. — S-ro Petro Varkanskas
Kaunas 5, Višinskio 25-3
Litovujo, U.S.S.R. | 134 poentoj. |

- | | |
|--|---|
| 7. — S-ro Joseph Salasc
5, rue de la Citadelle
Béziers | 125 poentoj. |
| 8. — S-ro Joh. Wieshofer
Linz - Aŭstrio
Wiener Reichstr. 2 | 121 poentoj. |
| 9. — S-ro Roger Milon
49, avenue Alsace-Lorraine
Brive (Corrèze) | 117 poentoj. (Ne par-
toprenis la 4an par-
ton de la konkurso). |
| 10. — S-ro Suchareau
8, place Saint-Sulpice
Paris-6 ^e | 94 poentoj. (Ne par-
toprenis la 4an par-
ton de la konkurso). |

Ni gratulas ĉiujn konkursintojn kaj precipe la gajnintojn. Ni bedaŭras, ke kelkaj ne partoprenis la tutan konkurson kaj, ke tial ili ne ricevis ia tuton de la poentoj, kiujn ili estus povintaj esperi. Ni rendevuas al ĉiuj je nia venonta konkurso, kies regularon vi legos en la sekvonta numero de la revuo.

Le Gérant : H. MICARD

IMP. COCONNIER, SABLÉ

«Ĉefurbo de ŝipkonstruado» la pasagerŝipo FRANCE bonorde emmarigis

EN SAINT-NAZAIRE



La 11-a de Majo 1960, ĝe la ĵus anoncita minuto (16 h. 15 mn.), sub la Prezido de Generalo de Gaulle, Prezidanto de franca Respubliko, kaj antaŭ pli ol 100.000 homoj, okazis la enmarigo de la pasagerŝipo FRANCE, la plej granda kaj la plej bela ŝipo en la mondo.

Ĝi estas 315,5 metrojn longa, 33,7 metrojn larĝa. Ŝia volumo estas 68.000 bareloj kaj dismeto : 55.000 tunoj. Ĝi havos 150/160.000 ĉevalpovon kaj povos transporti 2.045 pasaĝerojn je rapideco 31-34 nodoj de franca haveno Le Havre, ĝis Novjorko, haveno de Nordameriko, dum malpli ol 5 tagoj. La unua vojaĝo okazos dum la somero 1961.

Enmarigita kaj finita en Saint-Nazaire, « FRANCE » estas farita de elementoj konstruitaj en aliaj urboj de Francujo : Paris, Marseille, Lyon, Poitiers, Belfort.

Tiamanierre, FRANCE estos ne nur la plej rimarkinda realaĵo de « Sipfarejo de l'Atlantiko » en Saint-Naair, sed ankaŭ efektiva ambasadoro de la francaj tekniko kaj gusto.

LA JUNAJ

DETEKTIVOJ

ILUSTRITA RESUMO DE LA NOVELO DE J.H. SULLIVAN

(I-a parto)




Post kelkaj tagoj. « Onklino, ĉu multaj kontraŭbandistoj transiras la riveron? » — « Kiel ili povus transiri ĝin? Oni tuj kaptus ilin! » Andreo komencis dubi pri la afero.



Dum Onklo kaj Onklino estis for: « Andreo! Rigardu, kion mi trovis! La ŝlosilo de la kelo. Venu, do, rapide antaŭ ol Onklino revenos. Ni vizitu la kelon! »

La kelo estis malplena. En la dua ĉambro ankau nenio! La infanoj atente ekzamenis la ŝtonajn murojn. Neniu sekreta pordo!




La sekvantan tagon, la kutima aŭtomobilo venis. « Hodiaŭ li venas vane » ridetis Andreo. « Estas neniu pakajo en la kelo. »

« Mi supozas, sinjoro, ke vi estas komercisto? ». La viro rigardis Andreon strange. « Jes, mi jam aĉetas de Sro Parano dum longa tempo. »



Post kelkaj minutoj, la viro foriris... kun la kutima pakajo! « Tio estas vera mistero », diris Andreo, « ĉar neniu eniris la kelon dum la tago. Oni enmetis ĝin dum la nokto! »



(Represita kun permeso de la aŭtoro kaj de la eldonistoj de « La Junaj Detektivoj ». La libro (43-a paga novelo kun 9 ilustraĵoj de Brenda Goodwin) estas aĉetebla ĉe Esperantaj Libroservoj, au rekte ĉe la eldonistoj, The Esperanto Publishing Company Ltd., 100 Long Lane, Rickmansworth, Herts. Anglujo, po 4 int. respondkuponoj.)

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (20 aŭst. ŝil.).

Belujo : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18.

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (6 ŝil.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (2,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33 (3 mark.).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (13 mark.).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (40 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (450 liroj).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Obĉrst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (6 kr.).


Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K (6 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (30 Zlotoj).

Svedujo : S-ro Rune Palmgren, Persikogatan 32 III, Stockholm-VALLINGBY (4 kron.).

Svislando : S-ro Pierre Metivier, Via Ferrera, Ascona (Tes.) (3 sv. Frank.).

Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (11 st.), aŭ respondkuponoj (8 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Sĉguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRĉSILLON

BAUGĉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitaĵn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grĉsillon, BAUGĉ (Maine-et-Loire) Francujo